Atendante tion, oni devas esti tre kontenta pri la fakto, ke la grandaj dokumentoj proklamantaj la naturajn hom-rajtojn kaj liberecojn, skribitaj nacie en la pasinta tempo, nun kunfandiĝis en internacia, universala Deklaracio.

48 nacioj, per siaj reprezentantoj en la Unuigitaj Nacioj, akceptis la Deklaracion kiel normon de principoj koncerne la rajtojn kaj liberecojn de la homo. Farante tion la nacioj konsentis, ke ili klopodos efektiviĝi tiun normon. Neniu nacio voĉdonis kontraŭ la Deklaracio, 2 forestis de la voĉdono, kaj 8 detenis sin.

Kompreneble la dokumento ne estas perfekta. Ĝi estas kaj devas esti kunmetita dokumento respondanta al la ideoj de multaj malsamaj popoloj kaj tial necese enhavas konsiderindan nombron da kompromisoj. Kiel tute tamen ĝi estas bona dokumento. Ni ne povas esperi iam atingi perfektecon, kiomfoje ajn ni revizius la tekston de Deklaracio, ĉar unu persono ĉiam povas imagi al si ion iomete pli bonan ol tio, kion alia persono vidas. Tial mi pensas, ke estis necese fari komencon kaj ke, en la lumo de praktika sperto, oni povos fari ŝanĝojn en la sama maniero, en kiu ŝanĝoj okazis en multaj aliaj grandaj dokumentoj de la historio.

Eble pro la subskribo de la Interkonsento pri Genocido (rasmortigo) kaj pro la akcepto de la Universalaj Deklaracio de Hom-rajtoj per la Membro-Ŝtatoj la Kunveno okazinta en Paris en 1948 estos konata en la historio kiel la Hom-Rajta Kunveno. Mi opinias, ke tiuj inter ni, kiuj estis delegitoj, estos fieraj pri sia ĉesto kaj kunlaboro, kaj mi ĝojas, ke la Prezidanto de la Tria Komitato, D-ro Charles Malik de la Libanona Respubliko, gvidis ĝin al sukcesa realigo de unu el ĝiaj plej malfacilaj taskoj, la fina akcepto de la Universalaj Deklaracio de Hom-Rajtoj.

— Tr. W.S.

# UNIVERSALA DEKLARACIO DE HOM-RAJTOJ

Teksto de la Deklaracio akceptita kaj proklamita de la  
Ĝenerala Kunveno de la Unuigitaj Nacioj, 10 Dec. 1948

Nia traduko de la Universala Deklaracio de Hom-Rajtoj estas kompilita el la plej bonaj partoj de du plenaj tradukoj. La unuan faris *S-ro Ralph Harry*, el Canbera, Aŭstralio, Membro de la Aŭstralia Delegitaro al la Unuigitaj Nacioj. Li mem partoprenis en la preparo de la Deklaracio, en Paris. La alian tradukon faris *Dr. W. Solzbacher*.

*KONSIDERANTE, KE* la rekono de la natura digneco kaj de la egalaj kaj neforigeblaj rajtoj de ĉiuj membroj de la homa familio estas la fundamento de libereco, justeco kaj paco en la mondo,

*KE* malestimo kaj malrespekto de hom-rajtoj kaŭzis barbarajn agojn, kiuj indignigis la konsciencon de la homaro, kaj ke la realigo de mondo, en kiu homoj ĝuos liberecon en parolo kaj kredo kaj liberecon de timo kaj mizero, estas proklamita kiel la plej alta celo de la ordinara homoj,

*KE* hom-rajtoj devas esti protektataj per regado de la juro, por ke homoj ne estu devigataj sin turni al ribelo kontraŭ tiraneco kaj subpremo, kiel fina rimedo,

*KE* estas necese akceli la evoluon de amikaj rilatoj inter la nacioj,

*KE* en la Konstitucio de la Unuigitaj Nacioj la popoloj denove proklamis sian kredon je fundamentaj hom-rajtoj, je la digneco kaj valoro de la homa persono kaj je la egalrajteco de viroj kaj virinoj, kaj ke ili interkonsentis pri antaŭenigo de la socia progreso kaj de pli bona vivnivelo en pli larĝa libereco,

*KE* la Membro-Ŝtatoj promesis realigi, en kunlaboro kun la Unuigitaj Nacioj, la serĉadon de universala respekto por, kaj efektiva rekono de, hom-rajtoj kaj fundamentaj liberecoj,

## AMERIKA ESPERANTISTO

KE komuna kompreno de tiuj rajtoj kaj liberecoj estas plej grava por la plena realigo de tiu promeso,

*LA ĜENERALA KUNVENO NUN PROKLAMAS* ĉi tiun Universalan Deklaracion de Hom-Rajtoj kiel komunan realig-normon por ĉiuj popoloj kaj nacioj, por ke ĉiu individuo kaj ĉiu organo de la socio, konstante memorante ĉi tiun Deklaracion, klopodu per instruado kaj edukado antaŭenigi respekton por ĉi tiuj rajtoj kaj liberecoj, kaj por ke ilia universala rekono kaj apliko per progresaj paŝoj naciaj kaj internaciaj estu garantiata inter la popoloj de la Membro-Ŝtatoj kaj inter la popoloj de la teritorioj sub ilia aŭtoritato.

### *Artikolo 1*

Ĉiuj homoj naskiĝas liberaj kaj egalaj je digneco kaj rajtoj. Ili estas dotitaj per inteligento kaj konscienco kaj devas konduki reciproke en la spirito de frateco.

### *Artikolo 2*

(1) Ĉiu homo sen distingo de raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politikaj aŭ aliaj opinioj, nacia aŭ socia origino, posedaĵo, naskiĝo aŭ alia kvalito, devas posedi ĉiujn rajtojn kaj liberecojn proklamitajn en ĉi tiu Deklaracio.

(2) Neniu distingo devas esti farata rilate al la politika, leĝa aŭ internacia stato de la lando aŭ teritorio, al kiu iu persono apartenas, tute egale ĉu la teritorio estas sendependa, sub kuratoreco, nememrega, aŭ sub iu alia limigo de sia suvereneco.

### *Artikolo 3*

Ĉiu homo havas rajton je vivo, libereco kaj persona sekureco.

### *Artikolo 4*

Neniu devas esti tenata en sklaveco aŭ servuto; la sklaveco kaj la sklavkomerco devas esti malpermesataj en ĉiu formo.

## AMERIKA ESPERANTISTO

### *Artikolo 5*

Neniu devas esti torturata aŭ punata kruele, nehumane aŭ degrade.

### *Artikolo 6*

Ĉiu homo havas la rajton esti leĝe rekonata kiel persono.

### *Artikolo 7*

Ĉiuj homoj estas egalaj antaŭ la leĝo kaj devas ricevi sendiference egalan protekton de la leĝo. Ĉiuj havas rajton je egala protekto kontraŭ ia diferenciga traktado ofendanta ĉi tiun Deklaracion kaj kontraŭ ia ekscito al tia diferenciga traktado.

### *Artikolo 8*

Ĉiu havas la rajton postuli, ke kompetentaj naciaj tribunaloj efike helpu lin kontraŭ agoj, kiuj ofendas fundamentajn rajtojn garantiitajn al li konstitucie aŭ leĝe.

### *Artikolo 9*

Neniu devas esti arbitre arestata, malliberigata aŭ ekzilata.

### *Artikolo 10*

Ĉiu homo akuzata pri krimo devas esti juĝata egalrajte per justa kaj publika proceso en sendependa kaj senpartia tribunalo, kie liaj rajtoj kaj devoj estas difinitaj.

### *Artikolo 11*

(1) Ĉiu persono akuzata pri krimo aŭ ofendo havas la rajton esti konsiderata senkulpa, ĝis kiam lia kulpo estas pruvita laŭleĝe en publika proceso, en kiu li havas ĉiujn garantiojn necesajn por sia defendo.

(2) Neniu devas esti konsiderata kulpa pri krimo pro iu ago aŭ preterlaso, kiu ne estis krima sub nacia aŭ internacia juro en la tempo, kiam ĝi okazis. La puno ne devas esti pli granda ol tiu, kiu estis aplikebla, kiam la ago aŭ preterlaso okazis.

### *Artikolo 12*

Neniu homo devas suferi arbitran enmikson rilate al siaj

## AMERIKA ESPERANTISTO

privataj aferoj, familio, hejmo aŭ korespondo nek atakojn al siaj honoro kaj reputacio. Ĉiu homo havas la rajton esti leĝe protektata kontraŭ tia enmikso aŭ atako.

### *Artikolo 13*

(1) Ĉiu homo havas la rajton vojaĝi kaj transloĝiĝi libere en la limoj de sia ŝtato.

(2) Ĉiu homo havas la rajton foriri de iu lando, inkluzive sia propra, kaj reveni al sia lando.

### *Artikolo 14*

(1) Ĉiu homo havas la rajton peti kaj ricevi en aliaj landoj azilon de persekuto.

(2) Ĉi tiu rajto ne povas esti alvokata en kazo de leĝa akuzo fakte bazata sur nepolitika krimo aŭ ago kontraŭa al la celoj kaj principoj de la Unuigitaj Nacioj.

### *Artikolo 15*

(1) Ĉiu homo havas rajton je nacieco.

(2) Neniu devas esti arbitre senigata de sia nacieco aŭ de la rajto ŝanĝi sian naciecon.

### *Artikolo 16*

(1) Plenaĝaj viroj kaj virinoj, sen iu limigo pro raso, nacio aŭ religio, havas la rajton geedziĝi kaj fondi familion. Ili havas egalajn rajtojn rilate al sia edzeco, dum la edzeco, kaj okaze de dissolvo de la edzeco.

(2) Edzeco povas esti komencata nur per la libera kaj plena interkonsento de la geedziĝontoj.

(3) La familio estas la natura kaj fundamenta grupa unuo de la socio kaj havas la rajton esti protektata per la socio kaj la ŝtato.

### *Artikolo 17*

(1) Ĉiu homo havas la rajton posedi propraĵon individue aŭ kun aliaj.

(2) Neniu devas esti arbitre senigata de sia propraĵo.

### *Artikolo 18*

Ĉiu homo havas rajton je libereco de pensado, konscienco



## AMERIKA ESPERANTISTO

kaj religio; ĉi tiu rajto enhavas la liberecon de ĉiu homo, ŝanĝi sian religion aŭ kredon, kaj la liberecon, konfesi religion individue aŭ en komuneco kun aliaj, publike aŭ private, en edukado, apliko, diservo aŭ en la praktikado de religiaj tradicioj.

### *Artikolo 19*

Ĉiu havas rajton je libereco de opinio kaj esprimado; ĉi tiu rajto enhavas la liberecon, havi opiniojn sen intermikso de aliaj personoj, kaj la liberecon, serĉi, ricevi kaj doni per iu metodo informojn kaj ideesprimojn, neatentante landlimojn.

### *Artikolo 20*

- (1) Ĉiu homo havas la rajton de paca kunveno kaj organizo kun aliaj.
- (2) Neniu povas esti devigata fariĝi membro de iu asocio.

### *Artikolo 21*

(1) Ĉiu homo havas la rajton partopreni en la regado de sia lando, ĉu rekte, ĉu pere de reprezentantoj libere elektitaj.

(2) Ĉiu homo devas havi egalan rajton fariĝi publika oficisto en sia lando.

(3) La volo de la popolo devas esti la bazo de la aŭtoritato de la registaro; la volo devas esti esprimata en periodaj kaj honestaj elektoj per universala kaj egalrajta voĉdono. La elektosistemo devas esti sekreta baloto aŭ samvalora libera voĉdono.

### *Artikolo 22*

Ĉiu homo, kiel membro de la socio, havas rajton je socia sekureco kaj rajtas postuli la realigon, per nacia klopodo kaj internacia kunlaboro kaj laŭ la organizo kaj rimedoj de ĉiu ŝtato, de la ekonomiaj, socialaj kaj kulturaj rajtoj necesaj por sia digneco kaj por la libera evoluo de sia persono.

### *Artikolo 23*

- (1) Ĉiu homo havas la rajton labori, libere elekti sian

## AMERIKA ESPERANTISTO

okupon, ricevi justajn kaj favorajn laborkondiĉojn kaj esti protektata kontraŭ senlaboreco.

(2) Ĉiu homo sen distingo havas rajton je egala pago por egala laboro.

(3) Ĉiu laboranto havas rajton je justa kaj favora pago garantianta al li kaj lia familio ekziston indan de homa digneco, kun aldono, se necese, de aliaj rimedoj de sociala protekto.

(4) Ĉiu havas la rajton fondi laboristajn sindikatojn aŭ aliĝi al ili por la protekto de siaj interesoj.

### *Artikolo 24*

Ĉiu homo havas rajton je ripozo kaj libera tempo, inkluzive de racia limigo de la laborhoroj kaj perioda, pagata libertempo.

### *Artikolo 25*

(1) Ĉiu homo havas rajton je vivnivelo sufiĉa por lia propra sano kaj bonfarto kaj tiu de lia familio, inkluzive de nutraĵo, vestoj, loĝado, kuracado kaj necesaj socialaj servoj. Li havas rajton je sekureco en tempo de senlaboreco, malsaneco, invalideco, vidvineco, maljuneco aŭ alia manko de enspezoj kaŭzata per cirkonstancoj neeviteblaj.

(2) Patrinoj kaj infanoj havas rajton je specialaj zorgo kaj helpo. Ĉiuj infanoj, ĉu naskitaj en aŭ ekster edzeco, devas ricevi la saman socialan protekton.

### *Artikolo 26*

(1) Ĉiu homo havas rajton je eduko. Eduko, almenaŭ en la elementa kaj fundamenta stadioj, devas esti senpaga. Elementa eduko devas esti deviga. Teknika kaj profesia eduko estu malfermata al ĉiuj, kaj pli alta eduko estu egale atingebla por ĉiuj laŭ ilia merito.

(2) Edukado devas esti direktata al plena evoluigo de la homa persono kaj al plifortigo de respekto por hom-raĵtoj kaj fundamentaj liberecoj. Ĝi devas akceli komprenon, toleremon kaj amikecon inter ĉiuj nacioj, rasoj kaj religiaj

## AMERIKA ESPERANTISTO

grupoj kaj subteni la klopodojn de la Unuigitaj Nacioj por la konservado de la paco.

(3) Gepatroj havas la unuan rajton elekti la specon de eduko donota al siaj infanoj.

### *Artikolo 27*

(1) Ĉiu homo havas la rajton libere partopreni en la kultura vivo de la komuneco, ĝui arton, partopreni en la progreso de la scienco kaj profiti de ĝi.

(2) Ĉiu homo havas rajton je protekto por la moralaj kaj materiaj interesoj, kiuj rezultas de iu scienca, literatura aŭ arta produkto, kies aŭtoro li estas.

### *Artikolo 28*

Ĉiu homo havas rajton je socia kaj internacia ordo, en kiu la rajtoj kaj liberecoj proklamataj en ĉi tiu Deklaracio povas plene realiĝi.

### *Artikolo 29*

(1) Ĉiu homo havas devojn al la komuneco, ĉar sole en ĝi la libera kaj plena evoluo de lia persono estas ebla.

(2) En la uzo de rajtoj kaj liberecoj ĉiu homo devas esti submetata sole al limigoj leĝe difinitaj por la nura celo garantii la necesajn rekonon kaj respekton por la rajtoj kaj liberecoj de aliaj kaj kontentigi la justajn postulojn de moralo, publika ordo kaj ĝenerala bonfarto en demokrata socio.

(3) En neniu kazo ĉi tiuj rajtoj kaj liberecoj devas esti uzataj en maniero kontraŭa al la celoj kaj principoj de la Unuigitaj Nacioj.

### *Artikolo 30*

Nenio en ĉi tiu Deklaracio povas esti interpretata en tia senco, ke ĝi donus al iu ŝtato, grupo aŭ persono, la rajton fari ion por la detruo de iu rajto aŭ libereco en ĝi proklamata.

[FINO]

# WILMINGTON GASTIGIS NIN

BABI LE MULO

Oni preskaŭ povus diri, ke la tuta urbo Wilmington, "la unua urbo en la unua ŝtato", festis la Nord-Amerikan Esperanto-Kongreson kun ni, de la 1-a al la 5-a de Julio. La Publika Biblioteko kaj grava banko (Security Trust Co.) organizis efikajn Esperanto-ekspoziciojn. La Komerca Ĉambro disdonis broŝurojn kun surprisita saluto al la Esperantistoj. Ĉiuj ĵurnaloj (la matena, la vespera kaj la dimanĉa) publikigis favorajn kaj detalajn artikolojn kaj raportojn. La radio-stacioj WILM kaj WTUX multe reklamis, speciale la unua, kiu dissendis ne nur novaĵerojn kaj raportojn, sed ankaŭ tri specialajn 15-minutajn programojn. La unuaj du estis intervjuoj de *S-ro Frank* kun la agema loka organizanto de la Kongreso, *S-ano Gilbert Nickel*. La lasta, kiu okazis sabate vespere, je treege oportuna horo, estis interparolado de *S-ro Taggart* kun *D-ro W. Solzbacher* kaj *Ges-roj G. A. Connor*. Por plivigli la programon la intervjuanto eĉ sukcesis instigi nian Ĝeneralan Sekretarion, ke li kantu solvoĉe *Hejm'sur la Step'*, kun interlinia traduko de S-ino Connor. Tiun lastan S-ro Taggart instigis, doni al la radio-aŭskultantaro malgrandan specimemon de la Cseh-kurso. D-ro Solzbacher iom klarigis la lingvajn problemojn en la internacia vivo.

Urbesto *James F. Hearn*, enoficigita nur la antaŭan tagon, malfermis la EANA-Kongreson per salutparolado, transdonante al S-ro Nickel simbolan ŝlosilon de la urbo. En la nomo de la Ŝtato Delaware *S-ro Harris McDowell*, Ŝtata Sekretario, sendis salutleteron, esprimante ankaŭ la bedaŭron de la *Gubernatoro*, *S-ro Elbert N. Carvel*, kiu ne povis ĉeesti persone pro gravaj laboroj en Dover, la ĉefurbo de Delaware.

Okazis du publikaj kunvenoj kun Cseh-demonstracioj de S-ino Connor, sabate vespere en la YMCA-domo, marde vespere en la Publika Biblioteko.

## AMERIKA ESPERANTISTO

Interese gan paroladeton faris *S-ro Thomas Goldman*, ĝis antaŭ nelonge Usona Vic-Konsulo en Rotterdam, Nederlando, nun en la Komerca Departemento en Washington. Li babilis pri la Esperanto-movado en Eŭropo, precipe en Nederlando kaj Svedujo, laŭdante la celkonscian agadon kaj bonan organizon de la movado en tiuj landoj. Ni ankaŭ havis vizitantinon el Eŭropo, *S-inon Laura B. Ley*, kiu estas membro de la Esperanto-Klubo en Andover, Suda Anglujo, kaj iom rakontis al ni pri la Esperanto-laboro en sia hejmlandregiono.

Ĉiuj kongresanoj multe ŝatis la belegajn Kodakrom-bildojn de *S-roj G. A. Swanson* kaj *Th. Goldman* pri la Universala Esperanto-Kongreso en Malmö.

Kvankam junuloj estis pli multnombraj nunjare ol en la pasintaj kongresoj, ni honoris la pionirojn de nia movado, speciale *S-ron Joseph Leaby*, kiu estis Ĝenerala Sekretario dum preskaŭ 10 malfacilaj jaroj kaj meritas la daŭran dankon de ĉiuj membroj.

Pri aliaj okazaĵoj vi legis aŭ legos en la speciala kongresraporto sendita al ĉiuj membroj de EANA kaj en la angla-lingva parto de nia gazeto. La Kongreso estis amika kaj harmonia kaj forte esprimis la necesecon de kunlaboro kun la Centra Oficejo, de organiza disciplino, de daŭra agado por la pligrandigo kaj plibonigo de nia Asocio. La Prezidanto de EANA tial fermis la Kongreson kun averto kontraŭ disigo de niaj fortoj kaj kun alvoko al unueca agado.

---

## KORESPONDEMULO

**EKZERCADO:** "Mi multfoje skribas Esperantajn leterojn *al mi*, kaj, fakte, kondukas furiozan leteran korespondon inter la dekstra mano kaj la maldekstra. Kaj kelkfoje la dekstra kaj la maldekstra fortege kaj varmege malkonsentas, kaj mi ektimas ke estos batalo! La varmega sango de la Irlandano ekdeziras komenci ribelon, kaj la Esperantisto, pacama kaj pacienca, favoras pacon. Tamen, iel mi ĉiam sukcesas konservi la pacon en la familio, kaj la Esperantisto ĉiam, ĉiam triumfas. Sed estas vibrige!!!"—*J. H. Furay*.

## KANADA INFORMO

*La Esperanto-Klubo de Toronto*, en sia maja kunveno, havis kiel ĉef-parolanton la estron de la Kanada Sekcio de la Internacia Skolta Jamboreo. Li prezentis kinofilmojn de la kunveno ĉe Parizo. En Junio, la Torontanoj piknikis ĉe la nova hejmo de la gesinjoroj Bragg.

R. C. *Palmar*, de Manitobo, oficisto en la Amerika Kriptogram-Asocio raportas ke tiu asocio nuntempe publikigas Esperanto-kriptogramojn en sia gazeto. Ilin verkis nia nova membro, S-ro Ferraris de Nov-Jorko.

"*Dum vojaĝo en Norda Ontario*", raportis Raymond Canon, "mia amiko, S-ro Fisher, renkontis Egiptan inĝenieron kiu vojaĝis trans la kontinenton. La Egiptano komprenis iom angle, sed ne facile komprenis la konversacion. Fine, S-ro Fisher demandis al la inĝeniero ĉu li parolas Esperante. La vizaĝo de la inĝeniero eklumiĝis kaj li respondis: 'Jes, jes, certe!' S-ro Fisher poste diris al mi, ke tio sufiĉe pruvis al li, ke Esperanto estas internacie uzata."

"*Trans la Lingvobaron*" estas titolo de bonhumora sed saĝa artikolo de *Pastro R. Edis Fairbairn* en la "Journal-Argus", St. Mary's, Ont. Dum multaj semajnoj *Pastro Fairbairn* estis malsana, sed li neniam perdas sian bonhumoron. En la artikolo li rakontis pri kiel li komencis lerni Esperanton, kaj kiel li finis lerni Esperanton: "Dum mia tria jaro en la kolegio mi malsaniĝis, kaj poste mi petis permeson forlasi la studadon de la Hebrea lingvo, ĉar mi antaŭvidis, ke ĝi ne multe utilis al mi. La estro diris, kun ekbrileto en la okuloj, 'Sed kial ne forlasi la studadon de Esperanto, S-ro Fairbairn?' Momente mia kutima stulteco forlasis min, kaj mi respondis, 'Ho, mi jam faris tion, sinjoro.' 'Sed', la estro respondis, 'mi ankoraŭ vidas leterojn en Esperanto sur via tablo'. 'Kompreneble', mi emfazis, 'vi komprenu, sinjoro, mi jam lernis Esperanton, kaj nun mi nur uzas ĝin.' Tio haltigis lin, kaj mi sukcesis forĵeti la Hebrean lingvon".

## ESPERANTO-KRONIKO

*S-ro Paul Nylén*, famkonata sveda pioniro de nia movado kaj aŭtoro de artikolo, kiun ni publikigas en la angla-lingva parto de nia gazeto, skribis al la Prezidanto de EA NA, ke li uzas numerojn de Amerika Esperantisto por propagando: "La enhavo estas tre oportuna por tia celo inter niaj svedaj edukistoj, ĉar multaj el ili nuntempe laboras fervore por la angla lingvo kiel 'mondlingvo'... Argumentoj en angla lingvo estas por ili la rimedo sole taŭga... Mi legis ĉion en via gazeto kun streĉa intereso."

*Multaj usonaj kaj kanadaj ĵurnaloj* atentigis en Junio pri Esperanto, raportante pri la nova aŭstra poŝtmarko honore al Esperanto (kun la verda stelo kaj la vorto "Esperanto" en la mezo). Multaj ĵurnaloj, ekz. New York Times, montris bildon de la poŝtmarko.

*S-ro Mark Starr*, Eduka Sekretario de la grava laborista sindikato ILGWU, Vicprezidanto de la Usona Komitato por Eduka Interŝanĝo, kaj bone konata Esperantisto, estis ĉefo de la usona delegitaro al UNESCO-Konferenco pri edukado de plenkreskuloj, en Elsinore, Danujo, fine de Junio kaj komence de Julio.

*En tre multe legata libro*, "Cheaper by the Dozen" (Malplikoste Dekduope), de Frank B. Gilbreth Jr. kaj Ernestine Gilbreth Carey, la aŭtoroj mencias Esperanton sur paĝo 167: "Dad's theories ranged from Esperanto which he made us study because he thought it was the answer to half the world's problems, to..." (La teorioj de nia patro iris de Esperanto, kiun li lernigis al ni, ĉar li konsideris ĝin la solvo de duono de ĉiuj mondproblemoj, al...)

*D-rino Luella K. Beecher*, Prezidantino de la Lima Esperanto-Societo (Ohio) kaj malavara membro de nia Subtenkomitato, skribis: "AE estas bonega kaj devus esti en ĉiuj publikaj bibliotekoj." Konsilo sekvinda! Ĉiu membro devus esti "komitato de unu" pri AE en sia biblioteko.

## ESPERANTO-KRONIKO

*Enketo pri Internacia Helplingvo* estas la titolo de grava raporto, publikigita de Sveda Esperanto-Federacio, laŭ peto de Universala Esperanto-Asocio. Ĝi estas produkto de multjara scienca esploro, farita laŭ iniciato de IALA (International Auxiliary Language Association) de *Profesoro Pierre Bovet*, Honora Direktoro de la Instituto por Eduk-Sciencoj kaj Eks-Profesoro de Eksperimenta Pedagogio ĉe la Universitato de Ĝenevo, kaj *Henrietta Ith*, sekretariino. La ĉefaj konkludoj estas: "De teknika vidpunkto, nia enketo montrigis favora al ĝenerala instruado de Esperanto kiel mondhelplingvo... Same, de psikologia vidpunkto,... Esperanto estas vivanta helplingvo, taŭga por esti rekomendata kiel sola mondhelplingvo." Ni esperas publikigi iomete pli detalan resumon en la anglalingva parto de AE. La raporto mem estas ricevebla de EANA (prezo 65 cendoj).

*En la Irlanda Legacio* en Washington nun deĵoras bona Esperantisto: la Tria Sekretario, S-ro Sean O hEideain.

*EANA-Atestojn pri Lernado* ricevis lasttempe: Dorothy A. Hamlin, Clarence M. Christensen, Anthony Thomas, kaj Eugene K. Cahill, ĉiuj en Portland, Oregon. Ni sincere gratulas!

*Vojaĝema libro* estas "Esperanto: The World Interlanguage", precipe la ekstra ekzemplero de S-ino Lillian E. Fuller, en Framingham, Mass. "Ĝi nun estas ĉe inspektisto pri la instruado de modernaj lingvoj en Albany, N. Y.", ŝi informas nin. "Li estas la kvara persono, al kiu mi sendis ĝin. Mi klopodas vojaĝigi la libron de unu al alia, elektante personojn, kiuj laŭ mia opinio povus havi intereson." Imitinda ekzemplo.

*Hispana Esperanto-Federacio* nun ekzistas kun sekretario en Valencia (Ruzafa 7). La unuaj numeroj de ĝia "Bulteno" estis tre interesaj. Ni deziras bonan sukceson al Esperanto-laboro en Hispanujo.



## ESPERANTO-KRONIKO

*Radio-amatoroj* tiel multnombre skribis al Geo. W. Bailey Jr. (RFD, Wilton, N. H.) post apero de lia alvoko en AE, ke li "bezonus sekretarion". Li pripensas la eblecon proponi al la tutmondaj radio-amatoroj Esperantistaj "verdstelanoj" ĉiusemajnan, eble sabate posttagmeze, kiam amatoroj povus fari novajn kontaktojn.

*Membro de la katolika Benediktana Ordeno* intencas fari ĝin nia bona samideano Austin Herschel, nun en St. John's Abbey. Li daŭrigas sian intereson pri Esperanto.

*Profesoro Nat. Svanholm* el Svedujo, kiu instruis en Upsala College, New Jersey, dum la pasintaj du jaroj, vizitis la Centran Oficejon por adiaŭi, ĉar li reiris la Svedujo. Li bone kunlaboris kiel membro de EANA.

*En la sveda Esperanto-gazeto "La Espero"* ni legas jenan raporteton de Filespo: "Bonan reklamon por Esperanto liveras usona samideano. Li aranĝas por la svedaj membroj de IAPK (Internacia Asocio de Poŝtmark-Kolektantoj) la usonajn unuataĝkovertojn por tre favora prezo, eĉ ne la duono de la komercistprezoj. Krome li enmetas en la kovertojn la plej novan propagandilon de la Esperanto-Asocio de Norda Ameriko. Ĝi estas malgranda anglalingva broŝuro, 'For better international understanding', kiu montras, kiel Esperanto estas uzata oficiale, komerce, instruade, science, religie kaj literature. Ne ĉiuj el la ricevantoj estas Esperantistoj, kaj ili povas per tiu filatela servo multmaniere sperti la uzeblon de Esperanto."

*Nerekta atentigo pri Esperanto* ofte okazas, kiam D-ro W. Solzbacher prelegas pri internaciaj problemoj. En Majo, kiam li diskutis pri la Atlanta Pakto, en dissendo de radiostacio WEVD en New York sub la aŭspicioj de la Prelegista Komitato por la Unuigitaj Nacioj, la estro de la programo prezentis lin kiel unu el la aŭtoroj de la libro "Esperanto: The World Interlanguage".

---

## DEZIRAS KORESPONDI

---

*Belgujo.* R. Defalque, Rouge-Porte, Nivelles (Brabant); 16-j. junulo dez. kor. kun knaboj 13-16-j. pri aeronautikaj aferoj, interŝ. PM.

*Ĉekoslovakujo.* Miloš Urban, Palackeho 1225-17 Decin IV; 32-j. edzo, oficisto en presejo, pri ĉiuj temoj, interŝ. PM. PK, fotojn, ktp.

*Finlando.* Touko Mäntynen, Kymintu 60, as. 19, Helsinki P.; 13-j. knabo dez. kor. leteroj kaj il. PK kun junaj usonanoj.

*Francujo.* Menou André, "Les Jumelles", Ch. V. 11, Route de Ganges, Montpellier (Hérault); 41-j. lignaĵisto, dez. kor. pri ĉiuj temoj, inkl. agrikulturaj (bredado de kokinoj, ktp.)

*Germanujo (Brita Zono).* Kurt Götze, Mühlenstr. 6, (24b) Büdelsdorf/Rendsburg; 50-j. komercisto, dez. kor. pri komerco kaj ekonomio, ankaŭ serĉas kor. por lernantoj en kurso.

*Hungarujo.* Emeriko Kuti, Veszprém megye, Vaszar; 21-j. poŝt-oficisto dez. kor., interŝ. PM, il PK.

*Japanujo.* Šoose Minami, Maenoheta 1399, Hanaoka, Matsusaka (Mie-ken); 40-j. komercisto, Esperantisto dum 23 jaroj, dez. kor. pri ĉiuj temoj, interŝ. gazetojn, ktp.

*Japanujo.* Senya Yukawa, 2526 Kitagawati Koori, Osaka, Japan; 18-j. studento en alternejo, dez. kor. kun junuloj.

*Japanujo.* Ryosuke Yamamoto, 193 Kitatanabe cho, Higashisu-miyoshiku, Osaka, Japan; studento en komerca universitato, dez. kor.

*Nederlando.* F-ino C. Toos Schouten, Dalweg 5, Hilversum, Nederlando. 26-j. fraŭlino dez. kor. kun usonanoj.

---

## THE LINGUAPHONE HOME STUDY COURSES

### ORDER YOUR LINGUAPHONE FROM E.A.N.A.

You can learn *ESPERANTO*, or any of 27 other languages, by the world-renowned *Linguaphone* Ear-Eye Method. Order through E.A.N.A. for benefits to both yourself and your Central Office.

The regular list price for *Esperanto*, complete course, is \$50. Special favorable arrangements for Members, Teachers and Clubs. Also *Canadian Members* will likewise receive favorable arrangements, and pay in Canada to Canadian agency without customs duty, etc. Write to us for details of our special *Linguaphone* offers.

**Esperanto, 114 W. 16th St., New York 11, N. Y.**

## POPULAR NOVELS IN ESPERANTO

<i>Murdo en la Orienta Ekspreso</i> , Agatha Christie, excellent & easy "thriller." Most popular of the "Epoko" series....	.50
<i>La Vidvineto</i> , J. de Alencar, love story of romantic Brazil, one of best beloved stories in South America .....	.40
<i>En Okcidento Nenio Nova</i> , Erich Maria Remarque, famed story "All Quiet on the Western Front," new stock, bound	2.75
<i>D-ro Dorner</i> , H. L. Egerrup, original and new novel about artificial insemination and a doctor's problems .....	1.85
<i>Kudlago, La Malgranda Eskimo</i> , N. Van Hichtum, 40-page story of native youth in Greenland. Easy and interesting.	.30
<i>Gösta Berling</i> , Selma Lagerlöf, the great story of Sweden's beloved author, in 2 parts, both in one de luxe volume, absolutely a "must" for every Esperantist, cloth .....	3.00
The same volume, also complete, but bound in paper....	2.35
<i>Sep Fratoj</i> , A. Kivi, one of Finland's greatest novels, now being acclaimed as a great event in Esperanto. Bound....	3.50
<i>La Granda Aventuro</i> , Szilagyi, several good novels in one volume. One of the "Stelo-Libro" series. Bound in bds....	2.25

## SELECTED DRAMATIC WORKS

<i>La Blanka Malsano</i> , Karel Čapek, unique 3-act drama which cleverly utilizes as a theme "the great white plague" to illustrate totalitarianism in all forms, and its "cure" in democracy as we know it in the "West." This great drama of the pre-war Czech author is really excellent. And it is printed and bound most beautifully. Cloth.....	1.50
<i>Pasko (Easter)</i> , August Strindberg, famed Swedish drama in three acts. Excellent Esperanto translation. Paper.....	.60

## NEW DANISH BOOK JUST RECEIVED

<i>Faktoj pri Danlando</i> , of the international series "Kiu-Kio-Kie." It is Denmark's equivalent of our "World Almanac," printed in Esperanto by the great newspaper <i>Politiken</i> . It is a remarkable encyclopedic booklet of 64 pages, on everyone-everything-everywhere of any importance to Denmark. Profusely illustrated, color plates and maps, and strictly up-to-date. An important contribution to the Esperanto movement. Use it in your promotion kit .....	.75
---	-----

Note, that when you buy books from *American Esperantist*, all profits are used to give you a better magazine and a better Central Office for E.A.N.A.

## **IMPORTANT BOOKS FROM BRAZIL**

### **Official Publications of the Government**

Books of great value to our movement, not only for high quality as Esperanto literature but also because they are published by official departments of the Brazil Government. These two quite different volumes serve as irrefutable answers to the question: "Do important organizations and governments use Esperanto?" They should be in every Esperantist's library.

#### **"Tipoj kaj Aspektoj de Brazilo"**

Entirely in Esperanto. Selections of articles published by the official Brazilian National Council of Geography. Beautiful volume on the life, customs, and country of Brazil (the Amazon, jungles, gauchos, natives, wondrous plants, diamond-hunters, etc.) Richly illustrated with 37 large full-page art engravings, suitable for exhibit or framing. Best coated paper, 152 pp, large format 7" x 10½". We have been notified of recent price rise, but while present stocks last you may choose as follows: Art-card covers \$2.50; card panels over leatherette \$3.25; leatherette stamped in gold \$4.00 postpaid.

#### **"Statistika Resumo pri Brazilo"**

All material in 3 languages: English, Portuguese, and Esperanto. A large and impressive book of Brazil statistics with full indices, by the official Institute of Geography and Statistics. Physiography, demography, economy, social welfare, culture, administration (with divisions in great detail). The full listing of terms in all fields, makes it a real contribution to Esperanto terminology (with English and Portuguese equivalents). A purely statistical and scientific production, with preface, indices and chart. 267 pp (nearly an inch thick), large format 7¼" x 10½", bound in strong flexible card covers. While they last, \$3.00 postpaid.

**Esperanto, 114 W. 16th St., New York 11, N. Y.**